

Christian Morgenstern,  
Novembra tago

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Pendas ĉirkaŭ dom' nebul',  
Ĉio interniĝas,  
Ne eliras iu ul',  
Ĉiu enpensiĝas.

Malpli laŭtas homa ar',  
Mutas ĉiu ero.  
Kiel sur la fund' de l' mar'  
Songas hom' kaj tero.

*Traduko de la Germana poemo "Novembertag" de CHRISTIAN MORGENSTERN (Kristiano Matenstelo, \*1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014-12-08.*

*Arg-1098-2218 (2014-12-09 11:39:43)*

*Pri la verkinto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Christian\\_Morgenstern](http://eo.wikipedia.org/wiki/Christian_Morgenstern).*